V-18679 Esperanto

JARLIBRO

1950

DUA PARTO

NEPRE LEGU PAĜON 2

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

JARLIBRO
de la Universala Esperanto-Asocio

1950
DUA PARTO

La enhavo de ĉi tiu Jarlibro ne povas esti represata, ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de U.E.A.

Copyright by Universala Esperanto-Asocio
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

NUR POR UZO DE MEMBROJ

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo

Prof. MIECZ. SYGNARSKI
Ex Libris L. 139/II

NOVAJ PAŜOJ—NOVAJ ESPEROJ

Se vi trarigardos ĉi tiun duan parton de la jarlibro vi vane serĉos la kutiman informon pri aldonoj kaj ŝanĝoj en la delegitaro. La kaŭzo estas simpla kaj interesa: nome, la unua parto de la jarlibro 1951 aperos jam en januaro—do, post nur mallonga tempo. Tio signifas, ke vi ricevos ĝisdatan informaron pri preskaŭ ĉio grava en nia movado multe pli frue ol kutime kaj povos uzi ĝin dum la tuta jaro.

Vi tamen trovos detalojn pri la nova komitato, informon pri la kotizoj por la venonta jaro, tre interesan raporton de la Estraro, kaj la finon de la *Marista Terminaro.* Post kelkaj semajnoj la du partoj de tiu terminaro estos haveblaj kune en unu volumeto laŭ la kutima formato. Ni ne povas nun indiki la prezon sed ni anoncos ĝin en nia revuo *Esperanto.*

Kiel jam anoncite, en januaro tiu revuo aperos en nova formato—tiu de la konata *Digest* 20.5 x 14 cm. Ĝi enhavos 32 paĝojn, sur kiuj ni esperas doni al vi ne nur ĉiun gravan informon pri nia movado kolektitan el la tuta mondo, sed ankaŭ multajn tre interesajn artikolojn pri ne-esperantaj temoj kaj literaturon altnivelan kaj popularan. Tio signifas, ke por la MA-kotizo la membro ricevos la jarlibron, unuan parton (proks. 250-paĝa), duan parton (proks. 60-paĝa), kaj la ekvivalenton de 350-paĝa, grandformata libro kun multaj ilustraĵoj (ĉar tiu formato estas facile bindebla kaj donos vere konservindan volumon). Tiu MA-kotizo estas malpli ol oni ofte elspezas en unu vespero por la propra amuzo!

Kompreneble ni povos tiel helpi al la movado kaj tiom doni al la Esperantistoj nur se ni ricevos bonan subtenon de ili. Ne forgesu, ke U.E.A. ne estas ni en la oficejo, ĝi eĉ ne estas la komitato; ĝi estas VI—

la membroj—kaj nur se vi laboros por ĝi vi povos alporti sukceson al via asocio. Tion vi povos fari

1. per senprokrasta pago de via kotizo por la venonta jaro (se eble, en alta kategorio);
2. per la varbo de aliaj membroj.

Se ĉiu konata Esperantisto estus membro de U.E.A., ni povus doni eĉ pli bonajn eldonaĵojn kaj entrepreni multan propagandon nun ne eblan pro manko de financaj rimedoj. Ni ja treege bone scias, ke estas vane esperi ke ĉiu Esperantisto aliĝos, sed ni scias ke la aliĝo de tre multaj novaj membroj estas ebla, kaj tio estos certa se vi mem mencios aliĝon al amikoj viaj kaj ne ĉiam lasos la aferon al tiu mistera persono—la aliulo!

Bedaŭrinde ankoraŭ restas multaj landoj en kiuj eĉ tiuj, kiuj volas aliĝi ne povas fari tion, ĉar eksterlandaj pagoj estas neeblaj. Inter tiuj landoj troviĝas Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Ĉinujo, Germanujo orientzona, Hungarujo, Jugoslavujo, Polujo, Rumanujo kaj Turkujo. Se vi havas Esperantistan amik(in)on en iu el tiuj landoj vi povas fari al tiu tre bonvenan donacon per pago de ties kotizo. Aŭ vi povas sendi al ni la kotizon kun indiko ke ni elektu la "adoptoton"; ni havas longan liston de personoj, kiuj sopire atendas tian helpon.

Jarlibro 1951. Ĉar tio aperos jam en januaro ni devas atentigi, ke ni devas ricevi tekstojn (kaj pagon) por reklamoj en la komenco de novembro 1950—plej malfrue antaŭ la 15a. Ni tre petas, ke membroj helpu al ni per la akiro de reklamoj. Ju pli multaj ili estas, des pli granda kaj interesa povas esti la jarlibro.

CECIL C. GOLDSMITH,
Sekretario.

LA NOVA KOMITATO DE U.E.A.

Adamson, E., Värmlandsgatan 18, Göteborg, Svedujo.

Baas, P. W., C. Krusemanstr. 43-III, Amsterdam Z., Nederlando.

Balech, Prof. E., Casilla de Correos 64, Necochea (Bs. Aires), F. C. Gral Roca, Argentino.

Bugajski, E., Zabkowska 38 m. 14, Warszawa, Pollando.

Bugge-Paulsen, Kapitano R., Dunkersgt. 3-II, Oslo, Norvegujo.

Canuto, Prof. D-ro G., Ospedale Maggiore, Parma, Italujo.

Connor, G. A., 114 West 16 Street, New York 11, N.Y., Usono.

Dahl, Einar, Box 900, Uddevalla, Svedujo.

Dedieu, F-ino J., 3 rue d'Arzac, Toulouse (Hte. Garonne), Francujo.

Domingues, D-ro C., Rua Alvaro Alvim 27, Rio de Janeiro, Brazilo.

Dratwer, I., Jagiellonska 27/23, Warszawa, Pollando.

Durrant, E. D., 15 Beaufort Road, Reigate, Surrey, Anglujo.

Gropuzzo, F-ino N., Vlaška 53-II, Zagreb, Jugoslavujo.

Jakob, Hans, Palais Wilson, Genève, Svislando.

Kempeneers, D-ro P., avenue Montjoie 19, Uccle-Bruxelles, Belgujo.

Kennedy, D., 3 Harelaw Avenue, Muirend, Glagow, S.4, Skotlando.

Kozlevčar, J., Gestrinova 6-II, Ljubljana, Jugoslavujo.

Kühlmann, G., Prins Jørgensgade 4 A II, København N., Danlando.

Lange, O., Vestergade 51, Odense, Danlando.

Lapenna, Prof. D-ro I., 33 Leconte de Lisle, Paris XVI, Francujo.

Liechti, F., Grunaustrasse, Rheineck, Svislando.

Malmgren, E., Heleneborgsgatan 6, Stockholm, Svedujo.

Mařik, J., Malá Štepánská 9, Praha II, Ĉeĥoslovakujo.

Nixon, F-ino V. C., 183 Woodlands Park Road, Birmingham 30, Anglujo.

Oliver, A. C., 120 Heronsgate Road, Chorleywood, Herts., Anglujo.

Pytloun, Fr., Hradec Králové II, 1010, Ĉeĥoslovakujo.

Saldanha Carreira, J., Av. Grao Vasco 33 r/c., Benfica-Lisboa, Portugalujo.

Setälä, Vilho, Onnentie 23, Helsinki-Kä, Finnlando.

Stenström, D-ro J., Ulricehamn, Svedujo.

Strönne, J., Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo.

Tvarožek, E. V., ul. Ambra Pietra 3, T. S. Martin, Slovensko, Ĉeĥoslovakujo.

Van Gindertaelen, D-ro T., Leopoldstr. 99, Mechelen, Belgujo.

Vondroušek, J., U. botanické Zahrady 31, Brno, Ĉeĥoslovakujo.

Warnier, G., 5 rue Claude Chahu, Paris 16, Francujo.

Weeke, F., v. Beverningkstraat 125, Den Haag, Nederlando.

ESTRARO

Prezidanto : E. Malmgren (Ĝeneralaj aferoj kaj rilatoj kun la Landaj Asocioj).

Vic-Prezidanto : D-ro P. Kempeneers (Intelektaj kaj kulturaj aferoj, kaj Fakaj Asocioj).

Membroj : H. Jakob (Ĉiuj publikaĵoj de U.E.A., Biblioteko, kaj Servoj).
D-ro I. Lapenna (Propagando ĝenerala, la Kongresoj, Juraj problemoj).
A. C. Oliver (Financaj kaj administraj aferoj, propagando de U.E.A.).

KOMISIITOJ

Dulingvaj dokumentoj: D-ro A. Bormann, Missundestr. 5, Bielefeld, Germanujo.

Internacia gazetara servo: E. Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg, Svedujo.

Lernejaj aferoj: D. Kennedy, 3 Harelaw Avenue, Muirend, Glasgow, S.4, Skotlando.

UNESCO-aferoj: E. D. Durrant, 15 Beaufort Road, Reigate, Surrey, Anglujo.

"ESPERANTO"

estas la oficiala organo de U.E.A. Se vi volas esti bone informita pri la stato de la Esperanta movado tra la mondo;

Se vi deziras legi interesajn artikolojn;

ABONU ĜIN

Tion vi povas plej oportune fari per aliĝo kiel Membro-Abonanto aŭ Membro-Subtenanto por 1951, kiam ĝi aperos en nova formato kaj kun pli bona enhavo.

U.E.A. KOTIZOJ 1951

Klarigo de la tabelo sur la sekvanta paĝo

MJ (Membro kun Jarlibro) ricevas membrokarton, membromark-folion, kaj la jarlibron (Unua Parto printempe; Dua Parto aŭtune).

MA (Membro-Abonanto) ricevas membrokarton, membromark-folion, la jarlibron kaj la oficialan gazeton *Esperanto*.

MS (Membro-Subtenanto) ricevas membrokarton, membromark-folion, la jarlibron, kaj la oficialan gazeton *Esperanto*. Li afable pagas pli altan kotizon por helpi al U.E.A. finance.

Patr. (Patrono) ricevas membrokarton, membromark-folion, la jarlibron, kaj la oficialan gazeton *Esperanto*. Li bonvole pagas la dekoblan MA-kotizon por helpi al pli efika laboro internacia.

Jarl. La cifero en ĉi tiu kolono indikas la prezon de tutpaĝa reklamo en la jarlibro. Duonpaĝa aŭ kvaronpaĝa (pli malgranda ne akceptata) reklamo kostas proporcie. La teksto de la reklamo kaj la pago devas atingi la Centran Oficejon plej malfrue la 15an de Novembro por la unua parto, kaj la 15an de Aŭgusto por la dua parto.

Esp. La cifero en ĉi tiu kolono indikas la koston de aparta abono al *Esperanto* por la tuta jaro.

Oni povas pagi kotizojn al la pagejoj indikitaj, aŭ al la Centra Oficejo:

Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

KOTIZOJ 1951

Lando	MJ	MA	MS	Patr.	Jarl.	Esp.	Valuto
Argentino ..	10	25	50	250	160	18	pesoj
Aŭstralio ..	5	12/6	25	125	80	8	angl. ŝil.
Aŭstrujo ..	10	25	50	250	160	16	sch.
Belgujo ..	35	90	180	900	600	60	fr.
Brazilo ..	15	40	75	400	220	30	kru.
Britujo ..	15*	22/6*	35*	135*	80	8	ŝil.
Danujo ..	5	12.50	25	125	80	8	kr.
Egiptujo ..	5	12.50	25	125	80	8	angl. ŝil.
Finnlando ..	180	420	—	—	—	—	fmk.
Francujo ..	250	625	1250	6250	4000	450	fr.
Germanujo ..	3	8	15	80	50	6	mk.
Hispanujo	25	60	120	600	400	40	pes.
Irlando ..	5	12/6	25	125	80	8	ŝil.
Islando ..	12	30	50	300	180	20	kr.
Italujo ..	500	1250	2500	12500	8000	800	liroj
Izraelo ..	250	625	1250	6250	4000	400	m.
Japanujo ..	250	630	1200	6300	4000	450	jenoj
Kanado ..	1	2.50	5	25	15	2	dol.
Kongo ..	35	90	180	900	600	60	b. fr.
Kubo ..	1	2.50	5	25	12	2	pesoj
Maroko ..	250	625	1250	6250	4000	450	fr. fr.
Nederlando	2.75	6.75	13.50	67.50	44	4.50	fl.
Norvegujo ..	5	12.50	25	125	80	8	kr.
Nov-Zelando	5	12/6	25	125	80	8	angl. ŝil.
Sud-Afriko ..	5	12/6	25	125	80	8	angl. ŝil.
Svedujo ..	4	10	20	100	60	7	kr.
Svisujo ..	3.50	8	16	80	50	5	fr.
Urugvajo ..	2	4.50	9	45	30	3	pes.
Usono ..	1	2.50	5	25	12	2	dol.
Aliaj landoj	5	12.50	25	125	80	8	angl. ŝil.

*enhavas la kotizon (10/-) al B.E.A.

PAGU LA KOTIZON AL

E. Inglesias Nuñez, Dehesa 1860, Buenos Aires.
L. E. Pfahl, 37 Seymour Street, Croydon, N.S.W.
F. Höfert, Penzingerstr. 121, Wien XIV/89.
Reĝa Belga Ligo Esperantista, Avenue Montjoie 19, Uccle-Bruxelles.
F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge. Pĉk. 4161.35.
Brazila Esperanto-Ligo, Praca da Republica 54, Rio de Janeiro.
Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W.11.
L. Jakobsen, Carit Etlarsvej 14, Aabyhöj.
Nassif Isaac, P.K.350, Cairo.
Joel Vilkki, Somero. Pĉk. 60253.
Union Espérantiste Français, 34 Rue de Chabrol, Paris 10. Pĉk. 855-35.
O. Bünemann, Isestr. 79-III, Hamburg 13. Pĉk. Hamburg 318-23.
D. Dalmau, Roger de Lauria 98, Barcelona.
L. O'hUiginn, Bothar Glasárd 16, Dublin.
Magnús Jónsson, Tysgata 1, Reykjavik.
L.Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, Roma.
P. Lachowitzky, Kerem Quar, Jerusalem.
Japana Esperanto-Instituto, Hongo Motomaĉi 1-13, Tokio.
Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, 114 W.16 St., New York 11, N.Y
K. Braet, B.P. 223, Athenée Royal, Jadotville.
Kuba Esperanto-Asocio, Apartado 1324, Habana.
L. Apcher, Boulevard Ras Aghil, Meknès.
P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag. Pĉk. 79167.
R. Rian, Box 178, Trondheim.
Brendon Clark, Leigh, N. Auckland.
D-ro S. Liebeck, P.O.B. 2721, Cape Town.
E. Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. Poŝtĝiro 44381.
O. Walder, Eigenheim, Romanshorn. Pĉk. VIII 12139.
D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Florida) .
Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, 114 W. 16 St., New York 11, N.Y., Usono.

aŭ al
Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate,
Rickmansworth, Herts, Anglujo.

SOMERO UNIVERSITATO

(Malmö 1948)

ENHAVO

Enkonduko .. *Rektoro Karl Söderberg, Svedujo*

La laponoj kiel kultura popolo *Profesoro B. Collinder*

La kimraj artofestoj .. .. *R. Rossetti*

El la mirinda naturo .. .. *C. Stop-Bowitz*

Astronomiaj sensacioj .. *Profesoro K. Lundmark*

Ĉefprincipoj de la nuntempa internacia juro .. .. *Profesoro D-ro Ivo Lapenna*

El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj .. *D-ro P. Neergaard*

La kalevala kulturo .. .. *Vilho Setälä*

Pri la sveda koopera movado *Rektoro S. A. Stahre*

Du sveda humoristoj kaj unu hungaro *D-ro F. Szilágyi*

La libro enhavas la tekstojn de la prelegoj en Malmö

Prezo 4 ŝil. Afranko 2p.
(13 respondkuponoj)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

RAPORTO DE LA ESTRARO DE U.E.A.

1-an de Julio 1950

1. **Enkonduko.** Ankaŭ en la jaro 1949 U.E.A. kreskis per iom pli ol 1000 membroj. La kresko certe estus multe pli granda, se ne troviĝus gravaj malhelpoj por pluraj landoj transsendi membrokotizojn, el kio sekvas, ke la varbado de aktivaj membroj en tiuj landoj devis ĉesi.

2. **Landaj Asocioj.** U.E.A. konsistas nun el 22 Landaj Asocioj. Novaliĝis Aŭstria Esperantista Federacio.

3. **Nombro de membroj.** La nombro de membroj je la fino de 1949 estis: AM 12822; MJ 863; MA4429; MS 365; Pat. 17; DM 193; HM 60; sume 18749.

4. **Delegitoj.** En la printempo 1950 ni havis :— D. 990; VD. 171; FD 788. Sume 1949.

5. **Komitato.** La Komitato konsistis el 39 membroj el kiuj 29 estas elektitaj de la Landaj Asocioj, 5 de la Delegitoj de U.E.A. kaj 5 alelektitaj.
Dum la kongreso en Bournemouth la Komitato havis 3 kunsidojn.

6. **Estraro.** La Estraro kunsidis okaze de la kongreso en Bournemouth kaj dum pasko 1950.

7. **Honora Membraro.** Dum la kunsido en Bournemouth la Komitato elektis en la Honoran Membraron s-rojn Ernest Archdeacon kaj Harald Thilander.

8. **Financoj.** La jarlibro montras la resumon de la spezoj kaj la bilanckonton pri 1949. La ĉi jara deficito £103, dependas antaŭ ĉio de la malfacilaĵoj sendi kotizojn trans la landlimojn.

9. **Oficejoj.** En Rickmansworth la oficistaro konsistis el S-ro Sekretario C. C. Goldsmith, S-ro Mason Stuttard, S-ino E. C. Oliver, kaj S-ino S. Theobald. En Ĝenevo S-ro Hans Jakob deĵoris honorofice.

10. **Gazeto.** Redaktoro estis S-ro Hans Jakob kaj helpredaktoro S-ro Mason Stuttard.

11. **Jarlibro.** La Jarlibro 1949 enhavis krom la kutimaj informoj pri U.E.A. ankaŭ Raporton de la Estraro de U.E.A. kaj Maristan Terminaron (Parto 1).

La Jarlibro 1950, unua volumo, aperis kiel kutime en aprilo. La Estraro decidis, ke venontjare la Jarlibro estu dissendota en januaro, esperante ke tiu aranĝo plifaciligos la varbadon de aktivaj membroj.

12. **Universala Kongreso 1949.** Al la kongreso en Bournemouth aliĝis 1534. La Kongreso estis sukcesa kaj vekis grandan atenton antaŭ ĉio en Britujo.

13. **Internacia Konkurso.** La internacian konkurson pri la proporcie plej granda kresko de la membraro dum la jaro 1949 gajnis Jugoslavujo per 224.4%, sekvas Islando per 132% kaj Svedlando per 124.5%. Ni gratulas la gajnintan asocion kaj ni admonas la ceterajn asociojn streĉi siajn fortojn por atingi la ĉefan lokon en la jaro 1950.

14. **Propagando por U.E.A.** Por fari propagandon por aliĝo al U.E.A., C.O. distribuis 26,000 ekzemplerojn de propagandfolio " Momenton, mi petas " kaj 5,000 ekz. de propaganda poŝtkarto. Krom tio estas pretigita (de s-ro estrarano Kennedy) prelegmanuskripto pri la serva sistemo de U.E.A. je dispono al la delegitoj.

15. **Internacia propagando.** Laŭ instigo de S-ro J. Strönne, estro de tiu fako, Propaganda semajno estis aranĝita en multaj landoj en la komenco de la aŭtuna studsezono.

16. **Prelegvojaĝoj.** Kiel speciala sendito de U.E.A S-ro estrarano prof. Lapenna faris prelegvojaĝojn en Francujo, Islando kaj Britujo. Ĉar tiuj vojaĝoj estis tre sukcesaj, la Estraro planas similan aranĝon en aliaj landoj dum la venonta aŭtuno. Detalaj raportoj pri la vojaĝoj aperis en nia oficiala gazeto.

17. **Internacia Gazetara Servo.** La Estraro komisiis al S-ro red. Einar Adamson, sekretario de TEĴA, organizi gazetaran servon. S-ro Adamson esperas komenci tiun laboron en la aŭtuno.

18. **Kongresa Gazetara Servo.** Laŭ propono de la Komitato L.K.K. de la Pariza kongreso decidis elekti komitaton, kiu disponigos al la gazetaro taŭgajn artikolojn, bildojn, k.t.p. pri la kongreso.

19. **Dumkongresaj konkursoj.** Laŭ decido de la Estraro okazos dum la universala kongreso en Paris Oratora konkurso por gejunuloj kaj Literatura konkurso.

20. **Someraj kursoj kaj restadejoj.** En nia lastjara raporto ni povis raporti pri pluraj aranĝoj por la esperantistoj. Laŭ ricevitaj informoj ĉiuj pasintjaraj eventoj tiel bone sukcesis, ke la aranĝintoj planas ion similan ankaŭ por tiu ĉi jaro. Ĝis nun anoncis sin la jenaj someraj kursoj aŭ libertempaj restadejoj; en Britujo, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Jugoslavujo, Nederlando, Norvegujo, Svedujo kaj Svislando.

21. **Fakaj Asocioj.** Naŭ Fakasocioj nun havas kontraktojn pri kunlaboro.

22. **Unesco-aferoj.** S-ro E. D. Durrant, komisiito por Unesco-aferoj, raportis ke li en majo 1949 interrilatis kun d-ro Jaimes Torres Bodet, ĝenerala direktoro de Unesco, kiu akcentis, ke kunlaboro inter la esperantistoj kaj Unesco pri aferoj de komuna intereso aŭ celado estas plezure akceptata.

Laŭ komisio de Unesco d-ro J. E. Holmström verkis raporton pri la problemoj de internaciaj fakvortaroj. D-ro Holmström trovas, ke Esperanto estus tre taŭga kiel " pontlingvo."

23. **Oficialigo de Esperanto.** La Komitato decidis instigi la Landajn Asociojn daŭrigi siajn penadojn ĉe la registaroj pri oficiala rekono de Esperanto, speciale per monsubvencio al instruist-kursoj aŭ simile.

Pri sia agado en tiu rilato 22 Landaj Asocioj sendis detalajn raportojn, el kiuj multaj estas tre interesaj. La Estraro gratulas la Landajn Asociojn pro la farita laboro kaj esperas ke ili sur la bazo de tiuj raportoj denove turnos sin al la koncernaj oficialaj instancoj kun taŭgaj konkretaj proponoj. Pligrandiĝis la sukcesoj pri tiu afero en la jaro 1949 kompare al 1948 kaj estas nia espero ke tiu kresko estos konstanta en la sekvontaj jaroj.

Ĉar la raportoj de la Landaj Asocioj meritas specialan atenton, ni resume publikigos ilin aparte.

24. **Radio.** Regulaj radiaj dissendoj okazis en Aŭstralio, Aŭstrujo, Brazilo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Nederlando, Pollando, Gvatemalo, Svedlando kaj Svislando. Hazardaj dissendoj okazis en pluraj aliaj landoj, ekz. en Britujo, Jugoslavujo, Norvegujo, Usono, k.t.p.

La plej multaj Esperanto-dissendoj okazis en Ĉeĥoslovakujo, en kiu lando Esperanto tenis la 6-an lokon el 21 lingvoj laŭ la longeco de la elsend-tempo.

Nia pozicio ĉe la radio ĝenerale estas kontentiga. Estas necese konstante ripeti, ke la sukceso de la dissendoj ne nur dependas de la lerteco de la prelegistoj sed ankaŭ de la publiko sendi dankleterojn al la radiostacioj. Por konservi nian pozicion kaj por plifirmigi ĝin ĉiu esperantisto devas konsideri kiel sian devon subteni per konfirmo aŭ danko.

25. **Kontakto kun la membroj.** Tio ĝenerale estis bona, kiel oni vidas laŭ la jenaj ciferoj pri korespondaĵoj en 1949 :

Ricevitaj	10,013
Senditaj	19,064
	29,077

26. **Finvortoj.** La Esperanto-movado troviĝas en stato de evoluo. Multaj problemoj aktualiĝas. En la proksima estonteco ni devos i.a. intensigi la propagandon por Esperanto kaj por aliĝo al U.E.A., utiligi la kolektitajn petskribojn kaj krei pli intiman kontakton kun la kunlaborantaj fakasocioj.

Por la Estraro de U.E.A.

E. MALMGREN,

Prezidanto.

OFICIALIGO DE ESPERANTO

(Aldono al la raporto de la Estraro de U.E.A., 1-an de Julio 1950)

La raportoj, ricevitaj el 22 landaj asocioj, estas grandparte tre interesaj ne nur pro la menciitaj jam atingitaj rezultoj, sed ankaŭ pro la antaŭpreparoj por la estonto.

Tie ĉi ni publikigas nur la ĉefajn faktojn pri atingitaj sukcesoj en la diversaj landoj, ĉar ĝuste tiuj faktoj estas gravaj por la plua laboro en tiu kampo.

Brazilo. La federacia registraro subvencias Brazilan Esperanto-Ligon. La eduka ministerio apogis konkurson inter gimnazianoj de la tuta lando, organizitan de B.E.L. En la ŝtato Rio Grande do Sul la registaro subvenciis kursojn. Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko kiel antaŭe aranĝis oficialajn kursojn por la ŝtatoficistoj. En pluraj urboj estis kursoj en lernejoj.

Britujo. Multaj kursoj, subvenciitaj de la ŝtato, okazis en lernejoj, vesperaj lernejoj kaj en aliaj institucioj. Oficiala kurso okazis en la eksterlanda ministerio por ŝtataj oficistoj.

Ĉeĥoslovakujo. La ministerio por informoj kaj eduko starigis Esperantan subsekcion kun 2 oficistoj. Kelkaj lokaj grupoj rivevis subvencion de la distriktaj konsilantaroj. Kursoj okazis en pluraj lernejoj.

Danujo. Esperanto estas oficiale aprobita kiel studtemo en la t.n. " vesperlernejoj." Dana Studenta Komitato Internacia aranĝis "Arkeologian tendaron en Aggersborg " 20 junio-20 julio 1950. En unu grupo Esperanto estis la oficiala lingvo.

Francujo. Kursoj nedevigaj okazis en la jenaj instruistaj seminarioj : Paris, Chalons-sur-Marne, Valence, Lyon, Tours, Besancon, Versailles kaj Toulouse. Porinstruista somerkurso okazis en 1949 en Granville kaj Angoulême; similan kurson oni aranĝos en Saint-Germain-en-Laye dum 1950. En 33 lernejoj oni instruis Esperanton al 418 gelernantoj.

Germanujo. La instruministro en Malsupra Saksio (Hannover) asignis 1,000 gm. por aranĝo de instruistkurso en Hustedt. Aliaj oficialaj porinstruistaj kursoj okazis en Berlin, München kaj Hamburg. Krome kursoj en pli ol 100 popolaltlernejoj. Oficialaj kursoj ĉe Federacia Fervojo por pli altaj oficistoj, por mezaj oficistoj kaj en faklernejoj. Federacia Fervojo instalis apartan oficejon por pritrakti Esperanto-aferojn. En la porinstruista katolika akademio kiel ankaŭ en la porpastra seminario en Bamburg (Bavarujo) okazis nedevigaj sed grandaj kursoj. Oficiala instruo de Esperanto en la universitato kaj la teknika altlernejo de München. Multaj kursoj en diverspecaj lernejoj.

Grekujo. La eduka ministro K. Tsatsos dissendis, 9 aŭg. 1949, cirkuleron, en kiu li rekomendis la geinstruistojn faciligi kaj subteni la libervolan instruadon de Esperanto.

Hispanujo. La movado en Hispanujo nun estas reorganizita kaj kursoj okazis en kelkaj lernejoj.

Indonezio. La Esperanto-movado komencis plifortiĝi.

Italujo. Privataj instruistkursoj okazis en kelkaj urboj. En Milano okazis 5 kursoj, subvenciitaj de la urbo.

Japanujo. En la kolegioj (fakaj universitatoj) de fremdaj lingvoj en Osaka kaj Kobe okazis oficiala instruado. En 10 oficiale aprobitaj japanaj legolibroj por la duagradaj lernejoj troviĝas ĉapitro pri d-ro Zamenhof kaj Esperanto. Eduka ministro asignis 20,000 enojn kiel premiojn al studantoj de esperantologio. Esperanto-grupoj troviĝas en pli ol 25 universitatoj kaj en pli ol 30 superaj lernejoj.

Nederlando. En 5 instruistaj seminarioj (Arnhem, Deventer, Haarlem, Hengelo kaj Leeuwarden) okazis subvenciitaj, nedevigaj kursoj kun 160 lernantoj. La oficejo "Esperanto ĉe la instruado" aranĝis porinstruistan somerkurson en Havelte. En 27 elementaj lernejoj okazis kursoj (proks. 1,000 lernantoj), el kiuj kelkaj estis devigaj. La jarkunveno de instruistoj ĉe mezgradaj lernejoj akceptis sen diskuto raporton pri Esperanto, en kiu raporto la komisiono rekomendas Esperanton kiel nedevigan studtemon.

Norvegujo. La plej granda koresponda lernejo, oficiale rekonita, "Folkets brevskole," eldonis kurson de Esperanto kaj faros vastan propagandon por tiu temo.

Polujo. Oni prezentis al la eduka ministro peton pri subvencio por porinstruistaj kursoj. En la universitatoj de Krakow kaj Lodz kaj en kelkaj lernejoj okazis kursoj.

Svedujo. Kiel en la antaŭaj jaroj la sveda parlamento laŭ propono de la registaro denove asignis 5,000 kronojn por la aranĝo de porinstruistaj kursoj. Kursoj por seminarianoj estis aranĝitaj en Göteborg kaj Lund. Kursoj en pluraj lernejoj tra la tuta lando.

Svisujo. En Zürich estis vesperkursoj en la meza lernejo.

Urugvajo. Oficiala feria kurso por geinstruistoj, 10 jan.-10 febr. 1950. Propono estis sendita al la estroj de Komerca lernejo kaj Normalaj institutoj por geinstruistoj pri enkonduko de Esperanto, kaj tiuj proponoj nun estas pritraktataj. En Pedagogia muzeo de Montevideo funkciis 3-monata duonoficiala kurso por instruistoj kaj aliaj personoj. Urugvaja geinstruista federacio aprobis rezolucion favore al Esperanto. 38-paĝa artikolo, verkita de Prof. M. Fernández Menéndez, aperis en la ĉefa pedagogia revuo.

Usono. Kurso funkciis en Teachers College en Troy, Alabama, kun 20 studentoj. Esperanto estis instruata en 5 universitatoj kaj en 7 lernejoj. Nacia Eduka Asocio eldonis broŝuron pri Esperanto en 40,000 ekz.

Tiu ĉi konciza raporto donas nur palan bildon pri la laŭdinda laboro de la landaj asocioj, laboro, kiu—se ĝi persiste daŭros dum la venontaj jaroj—kondukos la internacian lingvon al pozicio, kiu devigos la oficialajn instancojn doni al Esperanto la atenton, kiun ĝi meritas.

E. MALMGREN,
Prez. de U.E.A.

Sciencaj verkoj kaj disertacioj en Esperanto aperintaj 1949-1950

(Aldono al la raporto de la Estraro de U.E.A., 1-an de julio 1950)

Danujo : Resumo de Esperanto pri "Danish Species of Alternaria and Stemphylium" de d-ro Paul Neergard.

Nederlando : Resumo en Esperanto de disertacioj de d-ro Minnaert kaj d-ro W. Nijveld.

Norvegujo : D-ro Reiersøl : "Diferencialaj ekvacioj de specimenaraj distribuoj." Resumo en Esperanto pri "antarktaj poliĥetoj" de C. Støp-Bowitz.

Japanujo : Jukito Ota : " Malhelpa afiniteco de benzedrino-derivajoj al amino-oksidazo."

Masuo Hukuhara : (*a*) " Pri singula punkto de la ordinara diferenciala ekvacio de unua ordo,"
(*b*) " Pri la elvolvado de solvo de diferencialaj ekvacioj en la ĉirkaŭajo de ilia singula punkto."

Tokui Sato : (*a*) " Pri etendo de la teoremo de Carleman-Hukuhara rilate al asimptotaj serioj,"
(*b*) " Pri fikspunkta teoremo,"
(*c*) " Pri la limo de funkcisekvajoj."

M. Nagumo : (*a*) " Domajnokonserveco ĉe plenkontinua ŝovado en funkciala spaco,"
(*b*) " Rimarkoj pri fikspunkta teoremo en funkcialaj spacoj."

Secumi Miyamura : " Tertrema movado kaj kvalito de grundo ĉirkaŭ la urbeto de Gobo, Wakayama Prefektejo."

Resumo en Esperanto pri " Utilization of the by-products of Soybean protein manufacture " de Kawamura-Ŝin'itiro.

En la grava gazeto " Progress of theoretical physics," eldonita de " The Physical Society of Japan " aperis la jenaj disertacioj :

Kei Yosida kaj Syohei Miayahara : " Pri la teorio alojteorimaniera de feromagnetismo."

Syohei Miayahara : " Pri la teorio de kolektivaj elektronoj de feromagnetismo."

F. J. Belinfante (Purdue Univ., Usono) : " Supermultatempa teorio por mezonaj kampoj " kaj " Pri la kalkulado de elektromagnetaj fenomenoj per kampo de neŭtraj vektor-mezonoj kun neglektebla maso."

Laŭ iniciato de 10 famaj profesoroj pli ol 80 naturscienciistoj subskribis en aprilo 1950 " promeson " skribi fakajn disertaciojn (almenaŭ 1 el la disertacioj publikigotaj en 1 jaro) en Esperanto. Subskribis 45 universitataj profesoroj, 19 asistprofesoroj kaj docentoj, 9 inĝenieroj de ŝtataj kaj gravaj privataj laboratorioj kaj 9 aliaj famaj doktoroj.

AKADEMIO DE ESPERANTO

FINANCA RAPORTO PRI LA JARO 1949

Nederlanda valuto

Enspezoj		
Saldo komence de la jaro	f.	286,72
Transpagita el brita valuto ..		130,00
		416,72
Elspezoj		
Poŝtelspezoj	f.	52,92
Kontormaterialo		10,25
Kosto de cirkularoj		12,00
Kostoj de presajoj		68,17
Saldo fine de la jaro		273,38
		416,72

Brita valuto

	£	ŝ.	p.
Enspezoj			
Saldo komence de la jaro	66	17	6
Donaco	1	0	0
	£67	17	6
Elspezoj			
Transpagita al nederlanda valuto ..	12	4	0
Saldo fine de la jaro	55	13	6
	£67	17	6

Bonhavo fine de 1949 : Ned. f. 273,38 plus Angla £55 13 6.

J. R. G. ISBRUCKER,
Prezidanto.

ENCIKLOPEDIA VORTARO

ESPERANTA—GERMANA

E. WÜSTER

Jen verko senparalela en nia literaturo. Ne nur vortaro sed ankaŭ serio de monografoj pri ĉiaj demandoj rilate al Esperanta gramatiko, vortaro, uzado. Wüster, kun aro de helpantoj, zorge kribis la Esperantan literaturon, kaj kun aparta detaleco la verkojn de Zamenhof; komparante, pesante, klasigante, laŭ pleneco kaj perfekteco preskaŭ nekredeblaj. ENCIKLOPEDIA VORTARO estas la frukto de tiu kolosa laborado, multhoma kaj multjara. La enkonduko estas unika studo pri Esperantologiaj principoj, la transskribo kaj formado de teknikaj terminoj, kaj similaj demandoj.

Ĝis nun aperis kvar volumoj, A-KOR, kaj tiuj estas nun denove haveblaj. La ekzistantaj volumoj estas mino de trezoro—trezoro iom kaŝita por tiu, kiu ne scias la germanan lingvon, tamen eĉ por li elfosebla pere de vortaro, kaj ĝenerale sufiĉe komprenebla pro la multegaj ekzemploj Esperant-lingvaj kaj mallongigoj tre plenaj kaj klarigitaj.

Ĉiu volumo kostas 15 ŝilingojn anglajn, afranko 6p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

MARISTA TERMINARO

PARTO II

ANTAŬPAROLO
al la dua parto

Post la eldono de la Unua Parto mi ricevis utilajn kritikojn kiuj kondukis al kelkaj ŝanĝoj, ekzemple la neologismo *taki* anstataŭ *vejri*.

Mi estas aparte dankema al la sekvantaj sinjoroj kiuj bonvole kaj zorge korektis la nacilingvajn partojn kaj sen kies laboroj mi tute ne povus publikigi tiujn partojn :

S-ro Inĝ. J. R. G. Isbrucker (Hago, Nederlando),
Prof. J. Régulo Pérez (La Laguna, Kanariaj Insuloj),
S-ro M. E. Houzé (Melun, Francujo),
S-ro O. Brochmann-Sletterød (Oslo, Norvegujo).

PETER CLISSOLD,

Komandanto.

10. MARISTAJ RANGOJ KAJ DEĴOROJ

Oni povas traduki rangojn laŭ la naciaj vortoj aŭ laŭ la sekvanta tabelo. Komparaj armeaj rangoj estas montrataj. Uzu la prefikson *mar-*, *ter-*, *aer-* laŭ neceso. Ankaŭ uniformvestitaj korpusoj nemilitaj povas esti tiel nomataj, sed tiuokaze ne ellasu la prefikson *ŝip-*, *aviad-*, *polic-*, *flegl*aŭ la bezono, (Vidu *Esperanto Internacia* majo-junio 1944).

Laŭvorta nacia formo	Proponata internacia formo	
Mara	**Mara**	**Tera & Aera**
Admiralo de Floteo (kutime Ĉefadmiralo komandanta floteojn).	Ĉefmarŝalo, kiu komandas ĉiujn.	Ter-, Aer-marŝalo
Admiralo	Marmarŝalo. (Mar)submarŝalo	Ter-, Aer-submarŝalo
Vicadmiralo (kutime komandanta eskadrojn)	Ĉefadmiralo	(Aer) ĉefgeneralo
Kontraadmiralo	Admiralo	(Aer) generalo
Komodoro	Subadmiralo	(Aer) subgeneralo
Kapitano-de-ŝipo (kutime komandanta ŝipon) Kapitano	Ĉefkapitano	(Aer) ĉefkolonelo
Kapitano-de-fregato Komandanto	Kapitano	(Aer) kolonelo
Kapitano-de-korveto Leŭtenanto-Komandanto	Subkapitano	(Aer) subkolonelo
Leŭtenanto	(Mar)Ĉefleŭtenanto	(Ter) (Aer) ĉefleŭtenanto
Subleŭtenanto	(Mar) leŭtenanto	(Ter) (Aer) leŭtenanto
Kanonestro k.s.	(Mar) subleŭtenanto	(Ter) (Aer) subleŭtenanto

Laŭvorta nacia formo	Proponata internacia formo	
Mara	**Mara**	**Tera & Aera**
Kanonestroj, Ekipestroj k.s. (Oficiroj kutime pliaĝaj kaj promociitaj el malsupraj rangoj)	(Mar) serĝentleŭtenanto	(Ter) (Aer) serĝentleŭtenanto
Midŝipmano, Aspiranto	(Mar) ĉefkadeto	(Ter) (Aer) kadeto
Kadeto	(Mar) kadeto	
Ĉefa Suboficiro	(Mar) ĉefserĝento	(Ter) (Aer) ĉefserĝento
Suboficiro	(Mar) serĝento	(Ter) (Aer) serĝento
Ĉefa maristo	Ĉefmaristo, Ĉefsignalisto, Ĉefhejtisto, Ĉefradiisto k.s.	Ĉefpafisto k.s.
Korkapabla Maristo	Maristo, Signalisto, Hejtisto k.s.	Pafisto, Artileriano k.s.
Ordinara Maristo	Submaristo, Subhejtisto k.s.	
Ŝipa knabo	Junmaristo	

Oni povas loki fakon post la rangon: armaja, dentista, elektrista, flugista, kirurga, inĝeniera, instruista, kanonista, mekanista, navigista, proviza, radia, signala, teknika, torpeda, k.a. Ekzemple: Leŭtenanto Kanona, Subserĝento Mekanika, Marĉefleŭtenanto Dentista.

Aliaj rangoj kaj dejoroj k.s.

Ŝipestro tiu kiu estras ŝipon.
Majstra maristo licenciato por esti ŝipestro.
(Ŝip)subestro/Maato tiu kiu komandas sub la ŝipestro.
Ĉefa Leŭtenanto, Ĉefa Subestro, Ĉefa Ingeniero (t.e. Maŝinestro) k.s. La plej supera oficiro de ia fako.
Piloto spertulo, kiu direktas ŝipon en havenoj, riveroj, k.s.

(Ŝip)kasisto tiu, kiu administras la kontojn, kason, k.s.

Ekipestro supera suboficiro, ŝipanestro.

